1-a Jaro, N.ro 16 APERAS SEMAJNE 15. Januaro 1925

ESPERANTO je la servo S.A.T. de la tutmonda PROLETARO

# SENNACIULO

Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda

La abonprezaro kaj reklamtarifo troviĝas sur la lasta paĝo — Neuzitajn manuskriptojn ni ne resendas. — Represo de artikoloj permesata nur se oni citas la nomon de nia organo, kaj se oni sendas al la Red. du ekz. de la gazeto enhavanta la koncernan represaĵon. — Ponumera prezo: 0,05 dol.

Redaktoro: N. BARTHELMESS Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz | Gvidanto: E. LANTY 24, Boulevard Beaumarchais, Paris XI. | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

## Imperialismaj kulisoj de ĉiniaj okazantaĵoj

*A. Kantoroviĉ*

I

Nuntempa Ĉinio kun siaj grandegaj naturaj riĉaĵoj estas unu el la plej altvaloraj premioj de tutmonda konkurado de imperiismaj potencoj — la kampo, kie tiu ĉi konkurado estas speciale akra. La civitana milito en Ĉinio, samkiel ankaŭ en kelkaj sudamerikaj ŝtatoj, estas nur unu el formoj aŭ rimedoj de tiaspeca konkurado. Eĉ pli, kaŭze de sia geografia situacio kaj de siaj krudaĵaj kaj nutraĵaj provizoj, Ĉinio iĝas senpera kaj ĉefa centro de tiu grandega lukto, kiu rezultas el specialaj cirkonstancoj sur pacifika Oceano kaj ĝiaj bordoj.

La cirkonstancoj kunmetiĝas el tri fundamentaj momentoj: 1) senbrida aspirado de Japanio al demografia, ekonomia kaj politika ekspansio, al kreo de potenca imperio kun vastaj kontinentaj kaj insulaj posedaĵoj, kie maldensigita japana loĝantaro estus aperinta kiel superreganta klaso; 2) same decidema kontraŭago de Ameriko, kiu havas siajn planojn koncerne ambaŭ pacifikoceanajn bordojn kaj taksas la japanan ekspansion, kiel senperan minacon por si; 3) kaŭzata per tio pli-malpli neevitebla malkaŝa japan-amerika konflikto.

II

Ke Japanio estas la plej grava kaj agresiva el alilandaj faktoroj de l'nuntempa ĉinia efektiveco, pri tio oni ne povas havi eĉ plej malgrandan dubon. Sed ankaŭ inverse — Ĉinio prezentas por Japanio la objekton de tute eksterordinara eksterpolitika kaj ekonomia intereso.

La ekonomia flanko de japana interesemo je Ĉinio estas ligita kun bezonoj de Japanio en krudaĵoj, nutraĵoj kaj merkatoj por ĝiaj faritaĵoj kaj kun sentata de Japanio insista neceso plilarĝigi la bazon de sia kapitalisma disvolviĝo. En ĉiuj-ĉi rilatoj Ĉinio, situita geografie tiel proksime de Japanio, riĉa per provizoj, tute ne plene ankoraŭ eluzitaj kaj posedanta grandegan potencialan sorbkapablon de l'merkato, devas prezenti por Japanio tute eksterordinaran signifon.

Japanio celas subigi al si la tutan ekonomian vivon de Ĉinio sklaviginte ĝin por si kaj iom-post-iom foriginte de tie eŭropan kaj amerikan kapitalon.

Tiuj ĉi lastaj problemoj postulas certe politikajn metodojn. Kaj efektive, Ĉinio servas kiel objekto de maksimuma aktiveco de japana ekstera politiko kaj strategio. Nuntempe, kiel notas "Japan Cronicle" (14. oktobro), japana strategio ĝenerale distingiĝas per sia lukto pro Ĉinio kaj formuliĝas jene: 1) subteno de siaj armitaj fortoj sur tia nivelo, ke ili povu malhelpi al ajna kombinaĵo de potencoj, kiu estus provinta per militista forto solvi ĉiniajn problemojn kontraŭ interesoj kaj agoj japanaj en Ĉinio; 2) garantiigo de komunikado kun *Norda Ĉinio* en la okazo de milito kun ajna kombinaĵo de potencoj — celante subtenadon de kunligoj kun la fontoj de krudaĵoj kaj nutraĵoj en *Manĝurio* kaj *Mongolio.*

Tiamaniere Ĉinio fariĝas la ĉefa nodo de eksterpolitikaj, eksterekonomiaj kaj eĉ de pure-militaj interesoj de Japanio. La tuta ekstremorienta historio de la lastaj jaroj estas la historio de japana ofensivo en Ĉinion.

La celoj de japana imperiismo en Ĉinio nuntempe estas duspecaj. Antaŭ ĉio Japanio aspiras al iom-post-ioma alkutimigo kaj fincele al la rekta anekso de plej gravaj por ĝi vastaj terspacoj de Nord-Orienta Ĉinio — Manĝurio kaj Mongolio, kie ĝi jam estis sukcesinta firme fondiĝi. Fervojoj, industrio, komerco kaj eĉ moncirkulado estas en la manoj de japanoj. Japanoj ĝuas tie ĉi eksterordinaran politikan influon kaj specialajn jurajn privilegiojn. Plua plifirmiĝo sur tiuj ĉi pozicioj estas la nacia programo — minimumo de japana politiko, kiun povas rifuzi ne unu el alternantaj japanaj registaroj.

Sed post la programo-minimumo staras ankaŭ la programo-maksimumo, enhavanta la ideon pri aliformigo de tuta Ĉinio en postfronton de japana metropolo, kio starigos Japanion en la unuan vicon de tutmondaj imperiismaj potencoj kaj ĉiaokaze alportas al ĝi superregadon sur Pacifika Oceano. "Azio por azianoj sub direkto de Japanio" — jen la devizo de tiu ĉi politiko. Por sia sukceso ĝi postulas subteni Ĉinion en la stato de kolonia malforteco kaj forigi el ĝi alian, krom japana, alilandan kapitalon. Super tiu ĉi problemo agresiva japana imperiismo senlace laboras, eluzante Manĝurion kaj internan Mongolion kiel militejon kaj enirante aŭ forirante de tie laŭ cirkonstancoj.

III

Estas nature, ke tiu ĉi agresiveco de japana politiko devis renkonti akran kontraŭstaron antaŭ ĉio flanke de la plej granda oceana ŝtato — Ameriko, al kiu senpere minacas plifortiĝo de japana potenco kaj kiu krome riskas perdi sian ĉinian merkaton kaj plie — flanke de Anglio, kies komercaj pozicioj en Ĉinio troviĝas en danĝero. Ameriko kun pli granda, Anglio kun multe malplia aktiveco starigas,

kiel fundamentan celon de sia ĉinia politiko haltigon de Japanio de plua antaŭenirado kaj laŭeble — ĝian forpuŝon returnen. (Kiel ilo de tiu ĉi politiko aperas la principo de "malfermitaj pordoj" kontraŭe al la defendata de Japanio principo — de specialaj interesoj kaj de influ-sferoj.) De tie ĉi — la akreco de la lukto sur la ĉina teritorio — de la lukto, kiu haltiĝas nur en la momentoj, kiam Ĉinio estas penanta leviĝi sur piedojn kaj kiam kontraŭ ĝi renoviĝas la unueca fronto de imperiistoj.

Konforme al la postuloj de sia politiko, Japanio jam antaŭlonge subigis al sia nura influo manĝurian registaron — kun Ĉjan-Czo-Lin ĝi estigis "nedisŝireblan kunligon" (laŭ esprimo de "Osaka Majniĉi" — 6. oktobro). Sed ne kontentiĝante per tio, Japanio aspiras, iufoje sukcese, ankaŭ kontrolon super la centra registaro. Tamen lastatempe, post Vaŝingtono, post falo de "anjfuana" partio, kiu konsistis el japanaj dungitoj kaj favoritoj, post la tertremo, kiu treege malfortigis la landon, — Japanio sur ĉina teritorio estis devigita sin defendi. De alia flanko, Ameriko estis sukcesinta organizi pli-malpli unuecan fronton kun Anglio kaj per tio pli embarasi la situacion de l'malamiko. Plue Ameriko plifortigis sian specialan influon sur ĉjilian bandon, t. e. sur pekinan registaron. Japanio, nature, estis revenintà al sia tradicia politiko — al subteno de la landekstremaĵo kontraŭ la centro. Nome ĝi estis unuiginta ĉiujn nekontentajn elementojn kaj estis fondinta la minacantan kontraŭ-ĉjilian koalicion. (Finota) *Trad. S. Ŝabarin.*

# Nova Prezidanto en Meksiko

Kvankam neniam membro de Socialista Partio, laŭ sia propra aserto, S.ro Calles estis ĉiam socialisto kaj amiko de laboristaro. Li estas ekonomie sendependa, preskaŭ riĉa, kaj devenas de la peona[1]) klaso, el kiuj grandnombro liberiĝis pro multaj revolucioj. La plej grava el tiuj estis en 1910 kontraŭ regado de Diaz, kiu reprezentadis la profitinteresojn de feŭdala aristokrataro meksika kaj de eksterlandaj koncesianoj. La grandaj bienposedantoj estis kaj ankoraŭ estas tre riĉaj kaj donas okupon al grandaj masoj da peonoj, kies salajroj estas 10—20 cendojn potage; tiuj peonoj ne povas libere forlasi siajn laborojn ĉar ili ĉiam ŝuldas iun sumon al siaj mastroj.

Madera, kiu balote kaj milite venkis Diaz, estis negocisto kaj reprezentadis la ekstarantan burĝan klason meksikan kaj la usonajn olefont-posedantojn. La plej riĉa el tiuj estas Doheny, fifamiĝinta dum la lastjara oleskandalo. Madera, tamen, estis murdigita de Huerta, kiu iĝis prezidanto kaj kiu favoris anglajn koncesianojn. La tiama usona prezidanto Wilson, kiel ĉiam la estetikulo, estis tiel spiritfrapita ke li ne akceptis la registaron de Huerta, okaze la usonaj kapitalistoj subtenadis Carranza kiu 1913 forpelis Huerta.

La batalantaj grupoj proletaj de Zapatta kaj Villa, kvankam ne povantaj forigi kapitalistan ekspluatadon, plibonigis la sorton de mizerularo kaj enmetis armilojn en iliajn manojn; tiamaniere eknaskiĝis memcerteco de homegaleco en la animoj de la hieraŭaj servutuloj. Kiel diras D.ro Scott Nearing[2]), kiu ĵus revenis de Meksiko, "ĉiu malriĉulo aĉetas por si per sia ŝparita mono unue 44-kalibran revolveron kaj se li ankoraŭ havas monon li ankaŭ aĉetas por si pantalonon".

Laboristaro en la juna industrivivo meksika, kiel ĉiam, fartas pli bone ol dum sia kampar-feŭda vivo; ili organiziĝas spontane kaj senorde, kotizoj estas preskaŭ nekonataj kaj oficistoj ne estas pagataj. La registaro tre afable disdonas poziciojn al ĉiuj kompetentaj laborist-gvidantoj kaj tiamaniere malradikaligas la kompetentulojn. Sed la amaso, kiu ankoraŭ vivas sub la aŭreolo de 1910—20 revolucio, ĉiam naskas novajn revolucifortojn, kaj tio klarigas la efikecon de tiea Kom. Partio.

Koncize, la situacio estas tia: Oleo fariĝis unu el la plej necesaj produktaĵoj en la mondo. En la Tampika distrikto Doheny kaj aliaj posedas multegajn fontojn; iuj el tiuj fontoj elŝprucigas po *220000 barelojn potage.* (Antaŭ nelonge Doheny donis kiel subaĉeto 100000 $ ĉekon kaj por 650000 $ oleovalorrajton al meksika oficisto en hotelo Waldorf-Astoria, Nov-Jorko). Nu, Usono aŭ usonaj kapitalistoj (kio estas la sama), procentenmetis 4 bilionojn da dolaroj en Meksiko, kio jam igas tiun landon ekonomie usona, kvankam politike ĝi ankoraŭ estas meksika.

Ĉe manĝfesto kiu estis aranĝita de Nov-Jorkaj bankistoj por honori Calles li promesis gardi la interesojn de usona kapitalo kaj al meksika kampar- kaj laborul-popolo li promesis ke li laboros por ilia profito.

Li proponas, kiel oni diras ĉi tie, rajdi sur du ĉevaloj. Se li estos fidela al meksika malriĉularo, li povos fariĝi martiro kaj samtempe la lasta prezidanto de tiu lando, aliel li aliĝos la jam multnombran vicon de Scheidemann, Hillquit, Makdonald kaj kompanio. *Georgo Saville.*

1) Meksika servutulo.

2) Doktoro Scott Nearing estis profesoro en pensilvania universitato kaj estis eksigita pro sia vereca interpreto de Politika Ekonomio; dum la milito kontraŭ li estis procesite kiel kontraŭmilitemulo pro liaj asertoj en sia libro.

# Pri Meksiklando

*Ĉi-okaze ni aldonas por kompletigo jenan skizon eltiritan el "Arguso", kaj. nov./dec. 1924:*

Komparante la meksikan historion kun, ekzemple, tiu de Usono, oni facile komprenos la kialon de la grandega diferenco inter iliaj nunaj popoloj kaj problemoj.

Al Usono alvenis ne nur militistoj kaj aventuremuloj sed ankaŭ multaj konvenaj migrantoj anglaj, holandaj, francaj, plej parte honora anaro forkurante de politikaj aŭ religiaj eŭropaj malfacilaĵoj por serĉi trankvilecon kaj pacon.

Meksiklandon alvenis per ĉiu ŝipo multaj senkonsciaj aventuristoj, inter ili ĉiuspecaj perfiduloj al kiuj estis neeble restadi en sia patrujo. Venis pastroj por konverti idolanaron al kristanismo, kaj post ĉi tiuj lastaj, multaj aliaj por fondi monaĥejojn.

La ĉefaj estroj foje kunportadis familion, kiu nur restadis dum kelke da tempo, reirante Hispanion tiel baldaŭ kiel la viroj forlasis la postenojn, jam riĉiĝintaj.

Kompreneble, la aventuristoj klopodis riĉegiĝi je ia ajn maniero; aldone, la monaĥoj nenion produktadis, dume, la enlanduloj devis labori por subteni ĉiujn.

La sankta inkvizicio branĉiĝis en Nova Hispanio starigante la neprajn "Autos de Fe".[1])

Plendoj pri mistrakto iĝis tiel oftaj, ke oni leĝdonis kvazaŭ protektante la brunajn enlandulojn, sed tiuj leĝoj taŭgis nur por ilin konsideri kiel infanoj aŭ bestoj.

Poste, oni enportis sklavajn negrojn por iom mildigi la sorton de indiĝenoj.

Du jarcentoj post la konkiro, jam estis centmiloj da kreoloj-hispanidoj, mestizoj kaj mulatoj-nigrindiĝenidoj, — krom la senfina alfluo de hispanianoj.

Sed la registarajn postenojn havis nur la lastaj, la blankuloj naskitaj en la lando kaj la mestizoj, kvankam blankuloj, estis subpremitaj same kiel la indiĝenoj.

Resume: la nuraj mastroj estis la blankuloj naskitaj en Hispanio; ne gravis kiel mallertaj aŭ malkleraj ili estis.

Pro ĉio-ĉi kreskadis la malamo kontraŭ la "gachupin", vorto eble alportita de hispanoj mem, signifante aventuristo, kiu en buŝo de la enlandularo kaj kreolaro iĝis malŝata, malama signo.

En provinco Yucatan, dum la jaro 1761, Ĥacinto Kanek, „maya" indiĝeno, ekribelis kontraŭ hispanoj. Post persekutado fine lia armeeto estis venkita, kaj oni kaptis lin. Oni lin

1) Aŭtodafeo = brulmortigo de herezuloj. *(Red.)*

kondamnis kaj mortigis, sed kiamaniere! Unue, la registaraj soldatoj disŝiris lian karnon per fajroreniloj; poste frapromis liajn ostojn kaj fine bruligis la restaĵojn. Belega, civiliza ago! Oni taksas dekdu milionoj la nombron de meksikanoj mortigitaj de hispanoj dum ilia trijarcenta regado.

# Soermus en Leipzig

En klasbatalo ĉiuj kaj ĉiaj rimedoj taŭgas al revoluciulo, por malutili kaj fine frakasi la kapitalistan kontraŭulon. Tiom pli tiaj rimedoj, kies posedo plena kaj perfekta metus la pezoforton nepre en la manojn de venkanta proletaro, noblaj artoj kaj sprita penso. Ja, ni bone konscias, ĉar ni sentas ĝin ĉiupaŝe, ke en kapitalistaj landoj la burĝaro havas la monopolon sur ĉiujn havaĵojn kaj sur la tutan produktadon, inkluzive la art- kaj spiritproduktadon. Kaj ĉia provo de memstara proleta spiritproduktado restos kriplaĵo ĝis kiam ekposedos proletaro la ekonomian monopolon, forpelinte kapitalistan rabistaron. Tamen estus granda eraro, voli rezigni pro tiu ekkono je ĉiuj edukaj provoj inter nia klasanaro, eraro, kiu plej akre venĝus sin en la momento, kiam revolucio eksplodos en sia plej matura punkto kaj sukcesos forpreni per unu bato al burĝoj tiujn privilegiojn, kiujn ili posedas depost jarcentoj.

Do per tiaj konsideroj ni SAT-anoj okupas nian lokon en klasbatala fronto, kune preparas novan socian konstruaĵon, metante teknikan ilon, la lingvon esperanto, je la servo de proletaro. Ni eĉ ja konscias, ke la sennacieca lingvo per si mem entenas econ revoluciigan. Do ni SAT-anoj plej bone ankaŭ povos juĝi pri la valoro distinga de revolucia *muziko* kiel ilo de klasbatalo, de klaseduko. Ekzistas ja muziko proleta, kiu vere kapablas unuigi nin en sento unueca, klaseca, kiu sennaciigas kiel la komuna lingvo, ĉar tia muziko estas altgrade komuna proleta lingvo. Certe, ne en ĉiu regiono oni samgrade kutimas muziki, vivi kun kantoj sur lipoj. Ne ĉie, — eble —, la laboristoj kutimas protesti kontraŭ siaj mizero kaj subpremo, eligante el raŭkaj gorĝoj verve la sonojn de revoluciaj kantoj. Ofte ja eĉ la blanka teroro malebligas la maskantadon. Sed tamen, — ĉie, ŝajnas, kie estas ebleco, la masoj kunvenintaj por senti sin kolektivo, esprimas kante, kion ili sentas, — almenaŭ per la "Internacio", kiu finas la kunvenojn, kvazaŭ konfeso, admono al fideleco por la afero. Ĉu en kazernoj, ĉu en juĝejoj, ĉu en karceroj, — mi ne scius lokon, kie ne estus jam eksonintaj la sonoj de revolucia indigno per kanto esprimitaj... Oni ne asertas tro multe, se oni atribuas al la kantoj pli altan povon kaj inspiron sur la homojn, ol al paroloj. Tial ĉi-okaze estas konvene, atentigi ree kaj ree pri la nova unika "Proletaria Kantaro", eldonita ĉe SAT, kiu entenas multajn ofte emociigajn kantojn de tutmonda batalanta proletaro.

2. januaro la „ruĝa violonisto" Soermus, reveninte de Anglio, kie li de registaro estis devigita foriri 31. 12., ludis en Centra Teatro antaŭ multnombre venintaj proletoj de Leipzig. La Leipziga laboristaro jam pli ol unu fojon havis okazon, aŭskulti liajn koncertojn. Li do estis bone konata al ili. Tamen mi miris, ke tiom da laboristoj montris sian intereson por la ludo de tiu severa, por laikoj malfacile komprenebla muziko. Pro la disciplineco de la aŭskultantaro mi gajnis la impreson, ke la proletoj de Leipzig kutimas akcepti bonan muzikon. Eble la vigla kaj fama muzikvivo en Leipzig havas tian edukan influon sur la proletaran medion.

Kelkaj demandos, ĉu la proletaro tiras el sia laborgajno tiun plusan sumon, por viziti koncertojn. Ni formus al ni malĝustan imagon, se ni el la bonvizititeco de Soermus'a koncerto favore konkludus je la ekonomia situacio de la Leipziga proletaro. Ke multaj donis sian obolon, por aŭskulti la belegan ludon de kamarado, certe ne signifas, ke la vivkondiĉoj permesas al ili *facilan* elspezon de la sumo por muziko. Multaj ĉeestis, sur kies trajtoj estis skribita la mizero, sed ili venis, ĉar Soermus estas ilia amiko kaj kamarado, kiu alportis salutojn de la brita laboristaro.

Ne la programo, kiun li prezentis, per si mem povus entuziasmigi, sed la maniero, kiel li interpretas sian muzikon. Tiuj simplaj, mallertaj paroloj, kiuj enkondukas liajn prezentojn, kaj tiam la profunda esprimpleneco en la muzikaĵoj mem, kiu apogeas en la rusaj melodioj, en la laste prezentita Volga-kanto . . .

Kiel signon de internacia solidareco ni volis kolekti je lia instigo monerojn por la mizeraj infanetoj en *Glasgo*, kiujn dum vintro kaj pluvo pro nepago de lumono elĵetis sur straton la kapitalista ekzekutivo. Ni volis, — sed ne povis — ĉar la polico malpermesis tiun simplan helpagon de laboristo al laboristo.

Tiel indigno regis en animoj, kiam ni disiĝis de la belaj, revigaj, esperigaj sonoj de mallume-luma muziko, kiu montris al ni tra larmaj araneaĵoj la aŭroron de belega libera estonto! Se nur ekŝvelus gigante tiu indigno en koroj ĝis neretenebleco sekvigante la venĝan juĝon de ĝis venko ekbatalantaj proletmasoj! *Nubo.*

# Priestontaj zorgoj

En unu el la ĉef-ĵurnaloj de l'ĉef-kapitalistoj, en unu el la ĉef-kapitalistaj landoj, iu militista sinjoro ploregas la fakton ke ne povas esti enlogataj en la armeon sufiĉe da spertaj metiistoj. Estas demandate: "Kial ne ekzistas rezervarmeo?" "Kiu respondecas al la nacio, ke rezervoj ne ekzistas?" Kaj la militista sinjoro respondas: „Pro tio ke la politika tumulto kvietiĝos por iom da tempo, estas dece prienketi tiun-ĉi gravan aferon". Daŭrigante, li diras: "Por kalkuli niajn bezonojn kaj niajn aktualajn rimedojn detale, tiu-ĉi estas tasko super la forto de neoficiala skribanto. La materialo ne estas havebla kaj estus bona politiko flanke de l'aŭtoritatuloj preni pli libere en sian konfidon la publikon pri tiu-ĉi demando de rezervarmea manko . . . Pro tio ke detaloj ne estas donitaj, oni povas supozi, ke niaj rimedoj pri mobilizo kaj provizado de postaj taĉmentoj estas tiom hontindaj, ke sekreteco estas konsiderata la plej bona politiko . . . (Sed) estas al ni sciigate, ke la preciza nombro da spertaj metiistoj bezonataj nuntempe por la Ekstra Rezervo estas 20639, kaj en tiu-ĉi estas enkalkulataj:" (sekvas detala listo pri 28 metioj, kiun ni ellasas pro spackonsidero). Sed la militista sinjoro lerte daŭrigas: "La rekrutado de spertaj metiistoj al tiaj taĉmentoj, spite la ekzistanta senokupeco, estas neniamaniere vigla." Oni provis la enlogon de knaboj, sed malfacile akiris la bezonatan nombron "pro tio, ke la armea konsilantaro ne povis doni al la gepatroj ian ajn certigon, ke la instruado, kiun ricevus la filoj, estus rekonata ĉe la koncernaj metiunuiĝoj ĉe eksiĝo (elarmea). Kaj la skribanto nin sciigas, ke "la solvo restas ĉe la metiunuiĝoj kun kiuj intertraktado estas farata".

Tiu-ĉi ploregо al ni montras, ke la tempo de imperialismaj militoj ne ankoraŭ forpasis, malgraŭ la belbonaj vortoj kaj promesoj de l'politikistoj kaj aliaj; montras al ni, ke la kapitalistaj armeagentoj febre streĉas siajn cerbojn por al si havigi sufiĉe spertan metiistaron, — kaj ne estas malfacile diveni la kialon. Oni eĉ konfesas, ke intertraktadoj daŭras inter la armeaj aŭtoritatuloj kaj la metiunuiĝoj pri certaj tiurilataj demandoj. Oni konfesas aliflanke, ke spite senokupeco — loga, bona rekrutilo en la "liberaj demokratioj" havantaj "nedevigan" armeservon — la rekrutoj ne venis sufiĉe grandnombre kaj ke ili pli ŝatas resti hejme kaj ricevi la ŝtat-monapogon.

La leciono kiun mi deziras elmontri, konsistas en tio: la moderna armeo bezonas spertajn metiistojn, tiel por aktuala milita agado kiel por laboro malantaŭ la tranĉeoj; la venonta milito, multe pli „granda" (angle, la vorto 'grand' signifas 'bonega') ol la lasta "granda" milito; forbuĉos, ni ne scias, nek preskaŭ povas imagi, kiom da utilaj *ge*-laboristoj — SE ... Due, la metiunuiĝoj intertraktadas kun kapitalist-armeagentoj pri ĝustigo de certaj aferoj, plue pruvante la fakton, ke la supre menciita unuiĝmovado, en

tiu-ĉi lando, ja en la tuta angla lingvujo, estas porkapitalista, anstataŭ porlaboristklasa; ke ĝi ne *pli* povas esti nomata porlaborista ol la kapitalistarmeo mem, kiu, simile al la metiunuiĝmovado estas formata el simplaj laboristoj, sklavigataj kaj ordonataj de kapitalist-oficiroj.

Tiu-ĉi, verŝajne, fariĝas politika demando, sed la koncernaj radikoj troviĝas paralele sur la industria kampo, kie troviĝas reala rilataro inter la laborista kaj la kapitalista klasoj, nuntempe vualigata per la veneno kaj perfido pri klasharmoniigo, tenate de la metiunuiĝmovado (temas mi laŭsci̊ence, nepolemike), eksterdubigante la fakton, nepre pli-malplifrue konstatotan, ke tiu-ĉi metiunuiĝmovado estas la lasta kaj plej forta fortikaĵo kiun havas la kapitalista klaso kontraŭ la proletara revolucio (mi povas senhezite tion diri pri la tuta angla lingvujo almenaŭ), el kiu ni tiru la solvon: tuje pliintensigi la propagandon kontraŭ tiu-ĉi speco de "laborista" organizaĵo por ebligi la ekkreskon ĉe la proletaro de la ideo pri klasa, industria unueco, kiun la supre menciita movado aŭ malebligas, aŭ efike sufokas ĉe ekapero. Kiam sufiĉe disvastiĝos tiu-ĉi klasunueca ideo, konkretigos ĝin la proletaro, sin organizante integrale laŭ industrio, ne je la mallarĝa vidpunkto de agado pri salajro ktp., sed je definitiva celo ekpreni kaj ekfunkciigi, por kaj per si mem, la soci-produktojn. Tiu-ĉi organizformo estas la nura pensebla potenco por la konstrua ago de l'socirevolucio.

Sed Industria Unionismo estas, en la nuna tempo, nur teorio, ne fakto. Do, por elmontri la teorian korektecon, la teorio mem devas korespondi la faktojn; baziĝi sur ili. Kiaj estas la kondiĉoj en lando de granda industrio? (kaj tiu nur respegulas la estontecon de ĉiuj landoj senescepte). Ni vidas hodiaŭ la fakton, ke ne nur tutaj industri-branĉoj, sed tutaj industrioj mem, troviĝas sub la kontrolo de unu kapitalist-kombiniĝo, kaj samtempe, flanke de la Laboristaro ne troviĝas unu klaskonscia, revolucieca Unuiĝo, sed multobleco da simplaj prisalajraj ktp. fakorganizaĵoj, ĉiuj el ili akceptantaj kiel finaĵon en socievolucio la kapitalistsistemon. Tiu-ĉi situacio estas diskutinda, ĉar en "Sennaciulo" oni povas legi raportojn pri la terura kaj ofte preskaŭ ŝajne senhelpa stato de la Laboristaro en iu aŭ alia lando. La grava afero ne estas argumentadi kien evoluos la kapitalismo; ĉiuj lertaj laboristoj tion ja bonege komprenas. La brula demando estas: Kiel organizi la proletaron industrie, klase, por eviti la kontraŭ ĝi efektivigatajn teroraĵojn de la krima, barbareca kapitalistklaso![1])

*D. Sherriff (1100)*

1) *Ni ne aperigas tiun artikolon, por sekvigi kiel intencas la aŭtoro, longecan diskutadon, — ĉar S. ne estas teoria organo — sed nur, por doni okazon al la aŭtoro, konigi siajn principajn ideojn. Kompreneble, se iu ano de profunuiĝo en Britio deziras verki informecan artikolon pri la rolo de fakunuiĝoj en la evoluo de brita laboristaro, ni ne rifuzus ĝin enpresi.* Red.

# TRA LA KLASBATALO

Musolini, la faŝista diktatoro, en parlamento faris grandan politikan paroladon, en kiu li minacas uzi ĉian ajn perforton por definitive frakasi la opozicion. Li ordonis mobilizon de la nacia milico.

La germana regna parlamento estas malfermita 5. jan. Multaj komunistaj deputitoj ne povis ĉeesti, ĉar ili estas arestitaj. La postuloj pri amnestio de la politikaj kaptitoj estas subtenataj de la masoj per demonstracioj.

"Daily Express" alarmas la danĝeron, kiu minacas okcidentan imperialismon pro prepariĝanta koncentriĝo de l'Oriento (Sovet-Rusio — Ĉinio — Japanio) kontraŭ la "Okcidento", menciante speciale la agadon de Sovetia ambasadoro Karahan.

**Tutmonda revolucio de l'proletaro kontraŭ mondimperialismo estas nia batalkrio, la ĉiujn popolojn en frata komuneco kuniganta tutmonda respubliko estas nia celo! Karl Liebknecht.**

# Por nia meminstruado

## Nova ciklo pri Sovetio

*Kaŭze de la novaj intrigoj, kiuj malgraŭ ekstereca agnosko de la jura stato de Sovetio, estas preparataj de la imper. potencoj kontraŭ ĝi, ni opinias necesa, ankoraŭfoje akre lumigi la estantan situacion, kiu ĉu rekte, ĉu nerekte, ĉiam turniĝas ĉirkaŭ la ekzisto de Sovetio.* Red.

Bedaŭrinde ne ankoraŭ venis la tempo, kiam estus eble objektive analizi la sovetan reĝimon. Ĉin ankoraŭ forĝas la vivo, kaj ne baldaŭ finiĝos tiu formado. Same la problemo pri komunismo restas ankaŭ nun pure teoria problemo. Nek la malprosperinta provo senpere enkonduki komunismon en detruita, senhava kaj blokata lando, nek la esperoj de venonta sukceso en pli favora cirkonstancaro estas konvinkaj por tiuj, kiuj ne havas religian kredon en teoriaj dogmoj.

En tiu ĉi skizo mi intencas paroli ekskluzive pri la ideoj jam efektivigitaj kaj pri nerefuteblaj atingaĵoj de proletaria diktatoreco. Sed ĉi tie mi devas aparte noti, ke se tiuj atingaĵoj ekzistas, do ili estas produktoj nome de proletaria diktatoreco, kaj en neniaj aliaj kondiĉoj estus efektivigeblaj.

Sur la fono de ruiniĝanta Okcidento, kiu implikiĝis en la propraj retoj de mensogo, perforto kaj hipokriteco, kiu dum sia longa jugregado kaj orumita despotismo perdis ĉiujn siajn idealojn, ĉiun orientiĝkapablon, kiu jam ne scipovas idealigi siajn krimojn, kiel ĝi tre lerte faris ĝis nun, kaj inertece ruliĝas al sia malhonora fino; sur la fono de tiu agonianta Eŭropo, kiu kvazaŭ dancas blindan kaj frenezan dancon, la lastan antaŭ la morto, la junaj sovetaj respublikoj ne povas ne aperi kiel kreanta forto, ŝprucanta freŝajn vivsukojn kaj komencanta novan helradian epokon por la elsuferinta homaro.

Henri Barbusse tre prave diras, ke socian sistemon oni juĝas laŭ ĝiaj rezultatoj. Certe, neniu, eĉ plej partiema malamiko povas diri, ke sep jaroj de soveta regado, sep jaroj ne de paca, krea laboro, sed de batalo, kruela, konsumanta batalo kontraŭ la tuta mondo, estas tempo sufiĉa por jam juĝi la rezultatojn. Sed ĉar tiuj rezultatoj, tamen, estas kaj ne tute malgravaj, — ili estas priparolindaj.

Ni analizu la situacion politikan. Ĉu multe da tempo pasis, de kiam oni ne alie traktis Sovetion, kiel ribelintan bandon, kun kiu la sola komuna lingvo estis lingvo de pafiloj kaj ĉiuspeca sufokado? Oni ĝin eĉ ne konsideris serioze, sed simple malŝatis. Eĉ la amikoj emis vidi en oktobra revolucio nur frenezan heroaĵon, antaŭe destinitan al fiasko. Nun eĉ la plej arogantaj kapitalistaj regnoj estis devigitaj, ne sen grincado, ĝin deklari kiel egalulon. En soveta kaj partia preso ni ofte renkontas la deklaron, ke Sovetlando estas nun la plej potenca regno en mondo. Ĉu tio estas simpla fanfaronado, ĉu ne estas aroganta paradokso, ke lando senhava, malriĉega, preskaŭ barbara en sia malklereco kaj primitiveco de ekonomia mastrumado sin deklaras la plej potenca kompare kun riĉega, armita Okcidento kun ĝia brila tekniko, civilizacio ktp.?

Efektive, se ni juĝus la potencon de regno laŭ la nombro de ĝiaj tankoj, militŝipoj kaj ĝia perfekteco en homdetruado per venenigaj gasoj ktp., ni devas konfesi, ke fiera deklaro de sovetaj rondoj pri potenco — estas ridinda. Sed la sorto de Germanio jam bonege demonstris al ni la malfirmecon de simila kriterio. Kaj malgraŭ la freneza militfebro, kiu denove ekposedis la kapitalistan mondon, oni povas ne sin trompante antaŭdiri, ke ne la militforto kaj armilprerogativo[1]) decidas la sorton de estonta milito. Unua, kion faros la popoloj mobilizotaj — estos demandi por kio ili devas militi. Kaj tiu sola demando sufiĉos, por ke la milito senprokraste aliformiĝu en revolucion. Kaj tiam helpos nek tankoj, nek venenigaj gasoj. (Daŭrigota.)

*Ida Lisiĉnik (3632), Kiev*

1) specialrajto, privilegio.

# S. A. T.-MOVADO

## Nia semajna gazeto ne similu iun ajn alian

Jam kelkaj k.doj substrekis, ke SAT-movado eniris novan epokon, t. e. epoko de aplikado, utiligo de mondlingvo je la servo de tutmonda proletaro. SAT estu fiera, ke ĝi la unua tion antaŭvidis kaj envivigis; ĝi daŭrigu sendogmece sed objektive studi la decidajn fortojn en la mondo, kaj elektinte sian propran vojon ĝi plenumu ĝin simple, sed energie.

Unueco de l' tuta mondo estas ja tendenco nediskutenda; ĝi efektiviĝas per scienco kaj tekniko; mondlingva movado ja respondas al tiu historia tendenco. Aliflanke ni, laboristoj, fidas ke nia klaso estas ilo de l'nuna historia procedo por antaŭenpuŝi la homaron. Tial ni estas revoluciuloj. Mondlingva SAT-movado sendube karakteriziĝas per sia tutmondeco kaj laborista revolucieca konsisto. Kaj tia ĝi nepre devas resti.

En ĉiu ajn movado kondiĉo de sukceso estas senĉesa antaŭeniro apogita sur firmaj akiritaj bazoj. Tiuepoke, nia plej grava akiro estas "Sennaciulo" kiu, helpata de S. R., celas *konkretigi* nian movadon. Kiamaniere semajna esp.a gazeto sur skalo tutmonda, sur bazo laborista kaj revolucieca, povas ludi sian rolon en nuntempo? Jen kerna demando.

Ni rilatigu nian S. je la kvar kampoj de revolucia movado, teorio, organizo, propagando kaj agitado. En organizo, S. nenion povas fari, ĉar ĝi konsistas el diversdevenaj elementoj. Pri teorio, krom hipotezo de supoza geniulo elkreskanta en SAT mem, — ni nur povas traduki aŭ komenti verkojn jam eldonitajn nacilingve, do ne tiom utilaj esperantlingve[1]. Por konigi la kelkajn gravajn verkojn netradukitajn nacilingve samkiel por teoria diskutado ni turnu nin al S. R. Senn. ne devas esti teoria organo.

Nun kelkaj vortoj pri propagando, t. e. pri transigo de iu idearo al malgranda grupo da personoj. Fakte ĝi ne povas okazi paceme inter la div. movadoj laboristaj, kaj ĝi kondukas rapide al disiĝo. Sed ĉu inter ni nun estas iu kiu opinias (ĉu anarkisto, ĉu komunisto), ke kiam ne unu el la div. revoluciaj organizaĵoj *praktike* faris ion por utili esp.on, ni devas disiĝi je du aŭ tri partoj? Nur fanatikulo povus respondi *jese* tiun demandon. Sekve S. ne povas esti, nuntempe, propaganda je la servo de iu ajn partio.

Agitado estas transigo de iu esenca ideo al granda amaso, pro tio ĝi necesigas iun fundamentan bazon, t. e. sociala teorio kaj masmovado. Ĉe SAT renkontiĝas diversfundamentaj ideoj de la socia movado, kaj granda amaso ankoraŭ ne ekzistas. Kiel regulo al kunlaboro de diversdevenaj elementoj el la revolucia movado, ni tre saĝe enskribis en nia statuto; "Celo a) — utiligi praktike esp.on por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda" — tio sufiĉas. Niaj agitinformoj baziĝu do sur klasaj celoj de la laboristaro. Kun tiu nepra regulo S. devas esti *parte* agita.

Do, resume: Kia do devas esti S.?

Antaŭ ĉio ni ripetu la esencon de SAT: *tutmondeco* kaj *laborista revolucia konsisto*, jen nia bazo. Pli supre ni provis montri, ke S. ne povas esti *esence* nek teoria, nek organiza, nek propaganda, nek agita gazeto. — Ĉar tutmonda S. devas esti informa gazeto; ĉar laborista kaj revolucia, ĝi devas *informi* pri proletaro; ĉar ĉiusemajna, ĝi ne povas konkurenci la informajn ĉiutagajn gazetojn. Nia S. estas malmultpaĝa, ni ne misuzu lokon, ni ne ripetu la "grandajn" informojn jam aperintajn ĉiulande en ĉiutagaj gazetoj. Tiajn novajojn ni menciu kiel eble plej mallonge sur posta paĝo, ne pro tio ke ili ne interesas nin, sed pro tio ke S. ne eksciigos ilin al ni, sed memorigos nin. Pri gravaj faktoj, ekz. ribelo, punsubpremo, ĝenerala balotado ktp. artikolo estu represinda nur se ĝi estas *originala* esence. Ni evitu kiel peston la senkolorajn ripetojn de ti-kion ni legas ĉiutage.

Kiu el ni, simplaj revoluciaj laboristoj, ne rimarkis sian *nescion* pri alilanda movado? Preskaŭ neniam ni povas mem juĝi, pro manko de objektivaj informoj, kaj la kvazaŭ kaprica movadfluo tutmonda tre ofte nin surprizas; aliflanke, kiu inter anglaj laboristoj, ekzemple, scias ion klaran pri moroj, vivkondiĉoj kaj pensoj de bulgara aŭ rusa laboristo? Jen kion ĉefe devas plenumi S. La tipa artikolo de S. devas doni iutempe skemon de iu regiona situacio rilate al laboristaro; tiu tasko estas tre malfacila, ĉar temas pri elekto de karakterizaj faktoj kiuj vere ludas plej gravan rolon Estas multe pli facile ripeti, komenti aliajn verkojn ol simple vidi klare kaj ĝuste inter la okazaĵoj nin ĉirkaŭantaj. Laboristo franca, skribinte tute simple pri vivo en sia urbo aŭ fabrikejo, sciigante per S., kion li opinias aŭ kion li deziras ekscii, pli utilas al ni ol kvazaŭ ĵurnalisto pritraktanta ĝeneralan temon.

S. aŭ ne devas vivi, aŭ devas posedi kaj eksterigi tute specialan econ. S. ne estu ĵurnalistejo, ĝi estu kolektiva laboro kvazaŭ anonima. Ĝi estu simple laborista informilo tutmonda kaj tiel serioza helpanto de laboristaro.

Praktike, — kio okazas nun? Redakcio en Leipzig ricevas multe da informoj, artikoloj ktp. Memkompreneble ĝi ne povas elekti inter la dokumentoj alilandaj, kaj rusaj k.doj verŝajne rimarkis aperon en S. de artikoloj nur agitecaj, sed kiuj neniel karakterizas la nuntempan vivon de la laboristoj en Sovetio. Ni profitu tiun ekzemplon por elmontri, ke artikolo de simpla nelerta laboristo ofte pli taŭgas ol tiu de t. n. intelektulo.

Nun fakte la artikoloj aperas iom laŭ ordo de ricevo. En tio ne tute kulpas Redakcio, kiu ja ne povas scii pri fluanta vivo de iu regiono. Sed jen, kion ĝi devus denun entrepreni kun helpo de Direkta Komitato: kunligi Leipzigon kun kerno de seriozaj k.doj el diversaj regionoj, — ne necesas kvanto, sed kvalito, — kiajn oni povus eltrovi helpe de la SAT-grupoj jam funkciantaj. Ankaŭ Redakcio provu elĉerpi el la multnombraj al ĝi skribitaj leteroj. Tasko de tiuj *respondecaj* korespondantoj konsistos el regula informo, sciigo de karakterizoj iutempaj rilate al ilia regiono. *El tiu kerno dependos pli kaj pli* sukceso de S. kaj de nia tuta movado. Sed tio tute ne malhelpu, ke SAT-anaro korespondadu al Leipzig; kontraŭe tio helpu Redakcion elekti unuflanke la materialon por S. kaj aliflanke aliajn taŭgajn korespondantojn.

En direkto de larĝa laborista informservo tutmonda ni starigu firman, seriozan kernon kiu estos bazo kaj aktivilo de nia movado. Tiu kerno estu anonima. Ni atentu, ke ĝi fariĝu apartеca (unika) nur per la laboremo kaj ne per la profito eĉ honora.

*R. G.*

1) Fakte, ni tradukas verkojn pli por fieri pri esp.a traduko ol por disvastigi la verkojn; ni devas atingi kontraŭon, t. e. esp.o devas esti fakte utila al la verkoj. Konsentinte, ke ni *nuntempe* ne devas rilati al tiu celo dogmece, ni tamen pensas ke jam estas tempo reagi kontraŭ la nia neĝusta tendenco.

# DISKUTEJO

## La projekto Dawes

Kiom interesa la artikolo: "La koloniigo de Germanujo"[1] ŝajnas esti al mi, mi tute ne povas forpuŝi koncepton mian, kiu estas: K.do Revo pritraktis bone kaj grandskale la temon, sed bedaŭrinde tro unuflanke. Ŝajnas strange ke mi, socialisto kaj klasbatalanto, klopodas defendi porkapitalistan financprojekton.

Sed la problemo ja estas la jena: Germanujo estas venkita ŝtato, ĝi estis devigita akcepti la kontrakton de Versailles humiligantan kaj maljustan, kaj ĝis nun ĉiuj strečoj por klare solvi la malfacilaĵojn kiuj ekzistis rilate al ĉefpunkto, la *riparpago*, nur estis tro unupartaj kaj enhavis karakteron tro diktatoran. Necesas do unue konfesi ke al la londona kunveno de la antantaj registaroj kune kun la germana sincere evitis tion, priparolinte amikece kaj akordeme la riparproblemon. Tio estas fakto kiu pezas eĉ por laboristaro, ĉar ne estrante la nunan ŝtaton kaj ĝis nun ne haviginte al si la tutan potencaparaton, ĝia sorto estas intime ligita kun tiu de l'burĝa ŝtato. Pri tio ni evitu iluziojn! Krom tio ja ankaŭ necesas konsideri la londonan akordiĝon ne nur je politika sed je ekonomia vidpunkto. Laŭ tiu ĉi opinio mia, mi devas diferenci kontraŭ k.do Revo kaj mi nun volas citi kelkajn diferencpunktojn ĉefajn reduktonte la deklarojn je nura teknika enhavo de l'Dawes-projekto.

Estas tute kompreneble ke internacia financistaro ŝatas realaĵojn, kapitalistmensado ja estas tiela. Malgraŭ ĉio la ŝtataj fervojoj ne estas tiom privatigitaj kiom la aŭtoro opinias, certe ili fariĝis memstareca organizajo, sed ne forgesu ke de ilia kapitalo, sumo de 15 miliardoj da ormarkoj, nur 2 miliardoj estas eldonotaj kiel la tiel nomitaj plifavorakcioj, la tuta restsumo, t. e. 13 miliardoj da ormarkoj restos en la manoj de l'germana regno. Kaj same la komisaro porfervoja ne estas "ĉiurilate plenrajta". Nur en la kazo ke la nova akcia organizajo ne povos transdoni sian devigan sumon laŭ Dawes, la komisaro rajtos je tio farmdoni la ekspluatrajton de la iamaj regnaj fervojoj sed ne je tio vendi aŭ eĉ nur farmdoni ilin en tuto. Favore estas ankoraŭ en citita kazo ke, se ĝi okazos kaŭze de neplenumo

*1) vidi n.o 12*

de pago, oni povos anstataŭi la ŝuldsumon per enspezoj de l'etato regna.

La regno havas superecon koncerne je la tarifoj, plue, ĝi povas postuli malpliigon ilian se la germana mastrumado bezonas tion. Ne "plialtigotaj fervojtarifoj per kiuj la komercaĵoj ankoraŭ plikariĝos" — kontraŭe al tio, oni jam malaltigis la porkomercajn tarifojn. Se la persontarifoj estas altigotaj, tio estas konforma al internacia koncepto je tio ke la enspezoj de iu entrepreno ĉiam devas kovri elspezojn siajn. Ĝis nun la persontarifoj estis artefarite malaltaj, oni ebligis tion transferinte kelkan parton de pluaĵo de l'porkomercaj tarifoj.

Ke la sumoj pagendaj rezultas el impostoj diversaj kaj limdepagoj, estas sen kontesto. La ŝtataj dogan- kaj impostkasejoj devas rekte transmeti siajn enspezojn al la komisaro porriparpaga, tiu retenas la 1250 milionojn da ormarkoj, sed la tuta restaĵo refluas en la regnajn kasejojn. Tiu komisaro tute ne estas "la potencega posteulo de Vilhelmo II", ho ne. La maniero kiel fluidigi la necesajn sumojn, sole rilatas al regna registaro. Neniu leĝo, neniu dekreto bezonas la komisaran konsenton, sufiĉas ke *la pagenda sumo estas atingata*[1]). La financkontrolo estas sen graveco *se* Germanujo plenumas la ripardevigsumon. Grava danĝero sendube estas ke la riparpagoj, kiuj restas germanie pro la stabileco de l'valuto, povas esti uzataj por aĉeti substancaĵojn industriajn, por akiri obligaciojn ktp.

Sed oni same finmetis ĉi tiun eblon por la internacia financaro riĉigi sin je kostoj de l'germana mastrumado, per la aldono ke, se tiuj sumoj germanie enmagazenitaj superos 5 miliardojn, la germana jarpagado estas aŭtomate malpliigota.

Mi tute ne volas kontesti malavantaĝojn de l'Dawesprojekto, al ĉio humana (? Red.) mankas iomete je perfekteco kaj al kapitalista solvo de iu ajn problemo antaŭ ĉio, sed necesas same rekoni faktojn kaj verojn jenajn: La Dawes-projekto restarigis la mastrum- kaj impostsuperecon de l'regno, ĝi malpermesis la tiel nomitajn "sankciojn"[2]) flanke de iu antanta ŝtato, ĝi kunigis la diversajn pagdevojn en unu (do forigo de elspezoj apartaj por l'okupacio, forigo de interlimdepagoj ktp.), ĝi finis la sistemon de nepagataj materialliveroj (ŝarĝoj laŭ *Micum*-kontraktoj). —

Kiel k.do Revo mi senkaŝe elparolas ke finfine la riparproblemo kaj precipe la plenumo de ĝia solvo (Dawesprojekto) *estas decidotaj inter la du grandaj klasoj: unuflanke la laboristaro, aliflanke la kapitalistaro.* Sed ne necesas pri tio ignori la malhelpajojn kiuj efektive ekzistas. Kio estas nuntempe la laboristaro klaskonscia? Ni ne tro flatu ĝin, ni prefere ekklarigu kaj eduku ĝin pri la ĉefa tasko, liberigo ĝia de la katenoj kapitalistaj.

Ĝis tien ni enkalkulu la burĝismon nunan, sian tutan kulturan, politikan kaj mastruman potencaparaton. Ho, mi ege ŝatus tuj ekestigi la socialistan ŝtaton, sed ekkonante kiom kontrastplena estas la nuntempo eĉ la "klasbatalema laboristaro" (mi estas skeptikulo pri tio) kontraŭ niaj aspirataj celoj, mi unue preferas la bazon de l'realo[3]), mia devizo do estas la jena:

Per la demokratia respubliko al socialismo.

Tio tute ne signifas forlasi la klasbatalan kampon.

*Sat-ano 300.*

## Esperantista semajno

Kdo. Sergio *Makovski* (no. 4026) proponas aranĝi "esp.istan semajnon" kaj deziras aŭdi la opiniojn de aliaj SAT-anoj pri tiu temo. Li skribas: «Esp-o ankoraŭ ne estas sufiĉe konata en la publiko; ni Satanoj devas fari ĝeneralan atakon kontraŭ tiu malbono, aranĝante espistan semajnon "Semajno de lingvo esp." (Ni proponus alian pli trafan titolon en okazo de la aprobo de tiu ideo, ekz. Semajno de Esp. por la proletaro, Red.). Por ke samtempe tutmonde efektiviĝu tiu "semajno", nia Direkta Komitato[4]) k.al.centraj organizaĵoj prenos iniciativon kaj per nia semajna gazeto "Senn." proklamos, ke dum la semajno de 26. aprilo ĝis 2. majo estos aranĝita "esp. semajno", en kiu SAT-anoj eluzu ĉiujn rimedojn por propagando: enpreso en gazetoj nacilingvaj, plakatoj, broŝurvendado, organizo de lekcioj ktp. Krom tio estos celkonforme, dum tiu tempo ĉiuloke aranĝi regnajn, regionajn kongresojn. Unuvorte en fabrikoj, tenejoj, kazernoj, havenoj ni devas klarigi pri esp. Mi proponas la suprenomitan daton, ĉar la 1. majo devas esti la ĉefpropaganda tago."

1) *La substrekoj estas de ni faritaj. — Red.*

2) *Tamen la Kolonja zono ne estas liberigata ĝustatempe. Ĉu tio ne estas sankcio? — Red.*

3) *t. e. la kapitalista ŝtato, en kiu la laboristo estas senrajta. — Red.*

4) Tiu propono ne rilatas al instancoj de SAT, ĉar SAT ne estas por-esp.a organizaĵo! Red.

---

*Por la vivaj prafortoj de l'socia revolucio, kies nehaltigebla kreskado estas la naturleĝo de l'socia evoluo, malvenko signifas stimulo, kaj trans malvenkon kaj malvenkon ĝia vojo kondukas al venko.* Karl Liebknecht.

# KRONIKO

**Germanio**

*München.* Post vigla propagandado la laborista grupo sukcesis aranĝi kurson en la popolaltlernejo kun 25 gekursanoj kaj krom tio 5 aliajn kursojn. Nun, post la sesa instruvespero partoprenas ankoraŭ 90 personoj. La grupo kunvenas regule merkrede vespere en la "Schillerhof", Schillerstr. 21.

**Sovet-Unio**

*Minsk.* En novembro Centra Oficejo de SEU organizis en kluboj de M. raportojn pri esp. En C. K. de kom. junularo k.do Snejko faris raporton "Intern. lingvo k. proletaro", Klys — "Praktika uzado de esp.". En ĉeleto enskribiĝis pli ol 50 p. En C. K. de prof. sindikatoj k do Kukelko faris rap. "Esp. k. proletaro". Kurso kun 40 p. En Centra Partia Klubo je nomo de K. Marks k.doj. Klys k. Snejko faris rap. Funkcias kursoj, same en hebrea klubo k. en klubo de presistoj. — Centra Esp. Klubo malfermita ĉiutage (krom mardo). Magazeno de libreldonejo "Kultura" malfermis esp. kurson. Minskaj esp.istoj eldonas sian muran gazeton.

*Moskvo.* Post somera interrompo reviglliĝis laboro en Moskva Esp.ista Klubo. Ĉiusemajne okazas esperantlingvaj raportoj: 4. 12. k.do Jodko raportis pri la lastsemajnaj politikaj okazintaĵoj; 11. 12. — k.do Demidjuk pri SAT-movado; 18. 12. — diskutvespero literatura pri tralegita nova poemo de k.do Nekrasov; 29. 12. — k.do L. Revo pri demokratio kaj diktaturo kiel regmetodoj de burĝaro.

*Murom.* Fondiĝis grupo el 5 k.doj ĉe Centra Sportklubo.

*Odessa.* Dum la lastaj tri monatoj Odessa Societo Esp.ista aktive propagandis, aranĝinte esp. ekspoziciojn en Centra Partia Klubo, en la klubo de Poŝtista sindikato kaj en Centra Lab. Biblioteko. Entute la ekspozicioj daŭris 26 tagojn, estis vigle vizitataj kaj vekis grandan intereson al esp. Precipan sukceson ĉe la ekspozicioj havis SAT-eldonaĵoj, kaj inter la lastaj estis pleje atentataj Jarlibro 1924 kaj Malgranda Terbiblio. Rezulte de la ekspozicioj kaj de raportoj nun funkcias kursoj en Centra Partia Klubo (35 partoprenantoj), kaj en Centra Laborista Biblioteko (48 partoprenantoj). La biblioteko de Odessa Societo nun funkcias kiel esp. fako de Centra Lab. Biblioteko.

*Rostov s. D.* Funkcias kursoj ĉe Eksperimenta lernejo je la nomo de Lenin (30 p.) kaj ĉe studenta komunloĝejo (25 p.)

*Samara.* De novembro rekomencis sian funkciadon esp.ista grupo ĉe la Fervojista Klubo. Komenciĝis nova kurso kun 35 p. *Dk.* (1516).

*Zaslavl.* Funkcias kursoj gvidataj de k.do Keimenko.

---

## Por kio mi bezonas akciojn de la Eldona Kooperativo?

*Kelkaj instruaj ekzemploj*

Eble vi, kara leganto, ne estas unu el tiuj idealistoj, kiuj sen demandi kaj sen heziti donas sian plian kotizon por akcio de Eldona Kooperativo, nur tial ke vi konscias kian utilon vi per tio faras al bonfarto kaj progreso de SAT. Eble vi estas unu el tiuj, kiuj volas havi realan garantion, se ili donas monon, volas vidi efektivan utilon de la afero, volas havi pruvon, ke tiu procedo profitdonas tiel al la kooperativo kiel al ili mem. Nu, kelkaj ekzemploj klarigu al vi la avantaĝojn de eldonkooperativaj akcioj:

Ekz. 1) Iu k.do aĉetis antaŭ 6 monatoj 2 akciojn po 1 dolaro. (Li estis iom favore salajrata faklaboristo, ne elspezis la monon por drinkado aŭ amuzado, sed rezervis ĝin por SAT). Nun li subite senlaboriĝis. La administranto de SAT fine de monato surstampis lian gazeton per "Via abono finiĝis". Li ne enspezas monon, por povi pagi. Li devus peti pagprokraston, se — li ne havus la 2 akciojn. Ili plene sufiĉas por plilongigi la abonon por duonjaro. Eĉ li povas aĉeti por la sumo ankoraŭ la nove aperintan broŝuron, kiun li volonte posedus.

Ekz. 2) Iu k.do en Anglio devas pagi malgrandan sumon al la administracio. Kiel konate, la plej malgranda valorbileto en Anglio valoras 10 ŝil. Tiun grandan sumon li nek povas nek volas sendi por la eta objekto. Tamen li ne emas ŝuldi la pagendan sumon. Sed jen, li aĉetis antaŭ kelka tempo kelkajn SAT-akciojn po ½ dolaro. Unu el tiuj biletoj ja ĝuste sufiĉas por pagi la ¼ jaran abonmonon. Li do per simpla letero sendas la malpezan bileton, kaj la ŝuldsumo estas pagita, sen ke li bezonis kunigi relative grandan sumon de 10 ŝil.

Ekz. 3) Iu k.do aĉetas 6 akciojn po 1 dol. kaj konservas ilin tri jarojn. Post tiuj tri jaroj lia monhavaĵo pliiĝis je sumo de 1,80 dol. pro la garantiita 10 % rentumiĝo. Li nun troviĝas en malbona situacio kaj nepre bezonas kontantan monon. Jen li rajtas ricevi de la kooperativo kontantan sumon de 7,80 dol.

Ekz. 4) Dum la transsendo en simpla, neregistrita letero perdiĝis akcio. Verŝajne ĝi estas ŝtelita. Kion faras la k.do, kiu sendis la akcion, por gardi nin kaj sin kontraŭ misuzo? Li anoncas al la administracio pri la forsendo kaj ŝajna perdiĝo. Tuj la administracio nuligas en siaj kontlibroj tiun akcinumeron, ne pagante la sumon al iu eventuala ŝtelinto, kiu nun alsendas la bileton. Tamen kompreneble en okazo de neanonco ĉiuj akcioj alsendataj de iu ajn al la administracio havas sian efektivan valoron, ĉar ili estas simplaj transpagiloj.

Mi esperas, ke tiuj ekzemploj servas al vi, por komprenigi al vi la utilon praktikan de niaj akcioj, kaj ke vi faros viajn disponojn tiucele je via individua kaj je nia kolektiva favoro.

---

*Ekzistis socialistoj, kiuj defendis la militarismon, dirante ke ĝi donas okupon al tiom da laboristoj, kiuj alimaniere devus resti senlaboraj, kaj vidante en tio utilon de l' militarismo. Se burĝaj politikistoj, kiuj opinias ke socialismo estas pura senpraktika revo, tiel defendas la militarismon, ĝi estas komprenebla. Sed socialisto devus ekvidi en la fakto, ke la kapitalismo povas daŭrigi la produktadon jam nur per plej freneza kaj plej mortiga malŝparego, nur argumenton plej konvinkigan kontraŭ la kapitalismo, sed neniam por tiu malŝparego.* K. *Kautsky (1907).*

---

*Ekzistas certa revolucieca metodo, por kuraci la popolon de ĝiaj iluzioj. Sed tiu ĉi kuracado bedaŭrinde estas aĉetata per la sango de l'popolo. Estis la sango de l'viktimoj . . ., kiu fiksis definitive la ekkonon kaj la veron por la larĝaj masoj: jen kion vi kungluis kiel tielnomata socialista registaro, estas nenio alia, ol registaro de la burĝa kontraŭrevolucio, kaj kiu plue toleras tiun ĉi staton, tiu laboras kontraŭ la proletaro kaj kontraŭ la socialismo.* Rosa Luxemburg *(Berlin, dec. 1918).*

---

*Neniu mano kondukas nin, neniu okulo vidas por ni; mankas direktilo, ĝin ni devas fari: tio estas granda tasko, kaj ĝi estas nia tasko.* *M. Guyau.*

# RECENZEJO

**Libroj**

**Proletaria Kantaro.** 180 paĝa verko kun 74 kantoj el 22 lingvoj: zorgeme presita kaj aranĝita. Formato 18×12. Kartonita. Prezo 3 mk. or. por malbonvalutaj landoj, 6 frk. sv. por bonvalutaj landoj. Eldona Kooperativo de SAT. Mendebla ĉe la Administracio de SAT, Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz.

Ricevinte tiun plaĉeprezentitan libron mi rapide turnis la paĝojn, kaj tuj rimarkis, kiel bone gravurita estas la muzika parto; grava punkto tro ofte ne sufiĉe atentita de la eldonistoj de tiaj verkoj! Unu post la alia, la kantoj pasis antaŭ miaj okuloj; multaj ne konitaj. Kion diri pri la belaj versoj: Krioj de sufero elirintaj el karceroj kaj malliberejoj! Krioj de mizero de la ĉiam ekspluatitaj laboristoj! Krioj de doloro kaj revenĝo antaŭ tombo de mortigita kamarado! Ardaj krioj de la Ruĝarmeanoj "marŝantaj por rekreo!" Melankoliaj kantoj de la Volgaj barkotiristoj! Kaj malgraŭ ĉio, kaj super ĉio, krioj de espero! La kolektaro estas vera kanttrezoro, kiun ĉiu SAT-ano devas nepre posedi kaj uzi. Kial ĉiu kurso, ĉiu grupo ne havus, en sia biblioteko, almenaŭ unu ekzempleron, por lernigi, dum ĉiu leciono aŭ kunveno, unu kanton, aŭ pli se eble, al la lernantoj kaj kamaradoj? Estas fakto ke malmulte inter ni oni okupiĝas pri kantado, tiu potenca propagandilo! Kial ne konsili al ĉiu lernanto aĉeti tiun proletarian kantaron samtempe kun lerno- kaj legolibro? Eble kelkiuj opinios ke la prezo estas iom kara; sed ni ne forgesu ke la kantaro enhavas 74 kantojn kun akompano de muziko; el ĉiuj presajoj la muziko estas certe tiu, kies prezo plej altiĝis, kaj la kamaradoj, kiuj kutimas aĉeti kantojn, ne miros pri tiu ŝajnanta alta prezo, kiam ili kalkulos la prezon de ĉiuj muzikaj akompanoj entenitaj en tiu libreto. Ni, do, aĉetu ĝin, kaj ni propagandu en niaj grupoj, por konigi ĉiujn kantojn. Kantante tiujn elkorajn kriojn de proletaro el tuta mondo en nia unueca lingvo, ni fortikigos senton de solidareco, senton de kunuleco, de sennacieco. *Frida.*

**Gazetoj.**

**Represis artikolojn:** *Le Libertaire,* Paris, 23. 12., Lab. vivo en Latvio (S. 11).

**Enpresis notojn, div. art.:** Oesterreich. Metallarbeiter, Wien, dec.; Basler Arbeiter-Zeitung, 6. 12.; The Post, London, org. de poŝtista unio, 3. 1. (komencas aperigi esp. kurson).

---

# Fragmentoj el "Dek jarojn en Persio"

15) *E. Rebrik*

Se Kuĉik-Hano ĉiam cedis kaj faris kompromisojn, male liaj rusaj amikoj-komunistoj tute ne deziris cedi kaj nepre volis realigi komunismon sur irana teritorio.

Unu el konataj rusaj revoluciuloj deklaris en intervjuo kun redaktoro de "Ruĝa Irano", ke savo de Persio estas en civila milito. En sama tempo tre gravaj faktoj maturiĝis. 31. julio okazis "*coup d' état*"[1]). Kuĉik-Hano estis flankigita de potenco, kaj gvidantoj de revolucia movado fariĝis du liaj amikoj-helpantoj Ehsanulla-Hano kiel prezidanto de milita-revolucia komitato kaj Halu Kurban kiel komisario de milito.

Kuĉik-Hano, kiu jam antaŭ longe komprenis, ke li — nacieculo kaj komunistoj havas diversajn vojojn, ree reiris siajn arbarojn kun siaj sindonaj amikoj kaj ree formis sian komitaton de „djengeli".

Unua kaj ĉefa afero de nova revolucia komitato estis milito ne sole kontraŭ angloj, sed ankaŭ kontraŭ ŝaha registaro, kiu vendis Iranon al angloj, farinte kun ili en 1919 kontrakton, laŭ kiu Irano fakte fariĝis kolonio de Britlando.

Tuj la gazeto "Ruĝa Irano" komencis ĉiutage informi legantaron pri sukcesa kaj venkportanta antaŭeniro de ruĝa armeo al Teheran. En ruĝarmea klubo oratoroj alvokis kamaradojn al tuja militiro al Hindio por helpo al sklavigitaj hindoj.

Poste nova komitato fermis bankojn kaj deklaris naciigon kaj konfiskadon de burĝarhavo, arestis tutajn adeptojn de Kuĉik-Hano, kiuj ne sukcesis forkuri en "djengeli".

Multaj komercistoj, burĝoj kaj oficistoj forlasis Enzeli kaj Reŝt kaj transveturis Teheranon aŭ kaŝiĝis en arbaroj ĉe Kuĉik-Hano.

Inter tio la antaŭeniro de ruĝarmeo ĉiam daŭris kaj, ŝajnis, ke en baldaŭa estonto estos okupata ĉefurbo de Irano — Teheran. En mezo de septembro ruĝarmeo jam estis preskaŭ antaŭ pordoj de urbo Kazvin, sed tie ĝi ekestis tute disbatita de ŝahaangla militistaro kaj rapide reiris al Enzeli, al bordo de maro, kie sub la ŝirmo de militŝipa artilerio ĝi povis sin teni kaj firmiĝi. Post kelke da tagoj venis el Baku kelkaj ruĝregimentoj, kun kies helpo Reŝt estis ree okupita, kaj fronto troviĝis je 40a kilometro post Reŝt, kie ĝi restis ĝis fino de revolucio.

Jen en malmultaj vortoj milita historio de Gilana revolucio, en kiu ĉefan gvidantan rolon ludis rusaj komunistoj.

En fino de februaro 1921 en Moskvo estis subskribita kontrakto inter reprezentanto de ŝaha registaro kaj soveta registaro. Laŭ tiu ĉi kontrakto Sovetregistaro donacis al Persio rusan bankon kun tuta aktivo kaj pasivo, rezignis je la ŝuldoj de Persio al Rusio, donacis ŝoseajn vojojn Enzeli — Teheran, Kazvin — Hamadan, fervojon Djulfa—Tabriz, rezignis je multaj privilegioj kaj koncesioj.

Unu el punktoj de tiu ĉi kontrakto devigis ambaŭajn kontraktantajn partiojn rezigni je ĉia enmiksiĝo en internajn aferojn de najbaro. Laŭ senco de tiu ĉi punkto rusaj militistaroj devus esti elkondukitaj el Gilan kaj en tuta okazo ĉesigi ĉian aktivan kunhelpon al persaj revoluciuloj. Vere, post okupado de Enzeli soveta registaro deklaris, ke ĝi alvenis Persion por repreno de blanka ŝiparo kaj havajo. Tamen, ni scias, ke ŝiparoj kaj multaj ajoj estis reprenitaj sed soveta militistaro ankoraŭ restis en Persio. Ŝaha registaro protestis kaj soveta registaro deklaris, ke ĝi efektive finis sian aferon en Persio kaj jam elkondukis sian armeon. Do ĉiuj, kiuj restis, estas memvoluloj en servo ĉe Kuĉik-Hano. Sovetregistaro deklaris ilin transkurintoj kaj ekster leĝo.

Sed nun post kontrakto soveta registaro devigis sin fakte elkonduki el Persio ruĝan armeon kaj komencis prepariĝi al tio.

**7. Revolucio en Gilan 1920—21.**

Tamen, kompreneble, rusaj ruĝarmeanoj ne povis tuj, unumomente forlasi Persion. Unue, estis necese konvinkiĝi, ke angla-hindaj taĉmentoj efektive ankaŭ forlasis Persion laŭ senco de sama rusa-persa traktato. En komenco de majo 1921 anglaj oficialaj informoj sciigis, ke anglaj taĉmentoj jam forlasis nordan kaj nord-orientan Persion.

Due, rusaj revoluciistoj certe ne povis lasi sen helpo junan malfortan persan revolucian armeon, kiu sin tenis nur per helpo de rusoj. Kie do serĉi la helpon? Ree oni rememoris pri Kuĉik-Hano. (Daŭrigota.)

---

1) uzurpo.

# KORESPONDADO

## TARIFO

**Korespondado: Unu enpreso:** Simpla dulinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la ŝamon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

*MALLONGIGOJ:* L = *letero.* PK = *poŝtkarto.* Pl = *poŝtkartoj ilustritaj.* PM = *poŝtmarkoj.* bfl = *poŝtmarko sur bildflanko.* k.ĉ.l. = *kun ĉiuj landoj.* esp.ajo = *esperantaĵo.*

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas **la devon, nepre respondi** almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

**Belgio**

Lab. Esp. Grupo serĉas por gelernantoj de du kursoj gekorespondantojn el ĉ. l. Bonvolu skribi al k.do: *P. Grignard,* Route de Stembert, 359, *Verviers.*

**Bulgario**

K.dino Cvetana *Coĉeva,* oficistino, *Kirĝali,* koresp. pri div. temoj k. ĉ. l. gek.doj.

**Francio**

24-jara hungaro intencas mondvojaĝi bicikle. Kiuj dez. lin akompani, tiuj skribu al jena adr.: K.dino *Thereze Bartha,* 1 rue du Général Blaise, (Hotel Garde) *Paris, XI.* La vojaĝo komenciĝos en printempo 1925.

**Germanio**

F.inoj *Helene kaj Gertrud Kiessling,* Raschauer Str. 19, *Oelsnitz-Raschau i. V.* interŝ. jurnalojn pri modoj, tolaja kudradosigno, k. ĉ. l.

F.ino *Ella Lenk,* Forststr. 25, *Oelsnitz i. V.* pri ĉ. t. L, Pl, k. ĉ. l.

K.do *Alfred Löhner,* Hauptstr. 4, *Oelsnitz i. V.* pri ĝardenkulturo, interŝ. vidaĵojn k. ĉ. l.

K.do *Hans Künzel,* Schmidtstr. 27, *Oelsnitz i. V.* interŝ. fakgaz. il. pri vapormaŝinoj, kaldronegoj, sindikatmovado k. ĉ. l.

K.do *L. Heinrichs,* Waldhauserstr. 152, *M.-Gladbach* (Rhld.) dez. koresp. k. ĉ. l. pri anarkismo. Ĉion mi resp.

K.do *Ch. F. Hochhäuser, Breslau III,* poste restante, petas ĉiul. k.dojn helpi al li trovi laboron, ĉu kiel metallaboristo skribisto aŭ tradukisto aŭ ian ajn; egale kie (krom hungario kaj polio). Li scipovas Esp. germ. pol. kaj jud. lingvojn perfekte kaj ital. portug. kaj hisp. ne tute perfekte. Helpu gek.doj.

**Sovet-Unio**

Grupo de junaj Lenin-pionìroj dez. koresp. kun laboristaj skoltoj kaj pioniraj organizaĵoj de la tuta mondo. Respondo nepra! Adresu: Al k.do *Berlin,* Klub Dogadova, Solanka 12, *Moskvo.*

K.do *Nejman* (stud. de Politeknika Instituto), Olgievskaja, 7/47, *Odessa,* pri scienca labor-organizo kaj precipe pri scienca menslabororganizo.

Miaj korespondantoj atentu mian novan adreson: *Tuapse* (Kaŭkazo), Ul. Oktjabrskoj revolucii 3, Bazilo Belakov (SAT n.o 3935).

Esperantista rondeto, 3 rajon, "Vodoprovod", n.o 2, *Astrahan,* pri laborista vivo, komunista movado kaj sporto.

K.do *Bazilo Averin,* Poŝtkesto n.o 14, *Astrahan,* dez. interŝ. PM, kaj papermonon. Ne sendu german. kaj ĉeĥoslov. poŝtmarkojn! La sendaĵojn adresu: Upolnomoĉennomu Filatelii, 1-a Tverskaja-Jamskaja, 3, *Moskvo* por B. Averin (filat. bileto 165) Astrahan.

*Tvera Laborista Junularo* dez. koresp. per esperanto kun jun. laboristoj de ĉ. l. pri ĉiuj temoj. En la unua letero priskribu profesian movadon kaj morojn de laboristaro en via lando. Adreso: Gorkomol, *Tver,* Sovet-Unio.

Tveraj profesiaj unuiĝoj starigas provon de korespondado *per esperanto* kun alilandaj profesiaj organizaĵoj kaj apartaj laboristoj. Unua provo de tia grandskala uzo de esperanto inter laboristaro. En unua letero skizu profesian movadon kaj nunan staton de laboristaro en via lando. Adreso: Kulturfako de G. S. P. S., *Tver,* Sovet-Unio.

**Sennacieca Revuo**

1a jarkolekto, 2a jarkolekto, 3a jarkolekto estas serĉataj. Kiu vendas? Proponoj al **Rob. E. Bitzer, München (Germ.), Hesseloher Strasse 11, II.**

# Al la anoj de la IIa Internacio

Karaj k.doj, ni ĝoje registris multajn leterojn je nia alvoko unua en Sennaciulo. Pro aliaj tre urĝaj esp.-aferoj ni ne jam povis respondi persone al ĉiu skribinto ĉu delegito aŭ izolulo. Pardonu tial! Krom tio ni ja rajtas uzi nian S. kiel publikilon; do bonvolu atente legi ĝin. Niaj unuaj taskoj estas jenaj: En ĉiu loko la k.doj elektu delegiton. Tiu prizorgos, se necese la specialajn lokajn aferojn kaj la interrilatojn kun ni. La adresojn ni plej baldaŭ bezonas, por ke ni povu presigi ilin en la Jarlibro. Se ni havos la efektivan statistikan materialon, ni ankaŭ sukcesos en la oficialaj rondoj de la IIa. En la venontaj monatoj ni komencos la interrilatojn kun ĝi.

Kompreneble ĉiu k.do restu ano de la loka grupo ĝisnuna, por ke ni evitu troan organizon same kiel ne intencitan partiĝon de la proletaria esp.-movado. Ni plej atentu la gazetservon unuflanke tradukojn por la lokaj gazetoj el S., aliflanke originalojn aŭ tradukojn por Sennaciulo. Verkante artikolojn por S. ni evitu tiel polemikadon, kiel ni deziras, ke la aliaj k.doj agu! Multaj k.doj skribintaj plendis tiurilate, ke kelkaj artikoloj de S. ne estas skribitaj tiusence. Ankaŭ ni devas konfesi, ke diversaj artikoloj en S. ne tute respondis al tiu postulo kaj enhavis ofendajn vortojn por anoj de la IIa. Sed ni pripensu, ke nia SAT-movado estas ankoraŭ tro juna kaj la verkemuloj estas ne jam tiom kapablaj kiel ni deziras; krom tio kelkaj kamaradoj rigardas SAT kiel perilo por unu sola proletaria partio. Kiam ni estos samverkemaj montrante la limojn de "necesa kritiko", tiam iom post iom estos ĉiuj artikoloj tiaj, ke ili montros bildojn rigardataj de iu certa vidpunkto kaj donos ideojn el certa konvinko neofendante iujn ajn aliajn, sed nur konkurante kun aliaj. K.doj leginte artikolojn, kiuj ne estas skribitaj en la efektiva senco de unueca proletaria esp.-movado, sendu ilin kun kritikoj, por ke ni ricevu la opiniojn viajn kaj ne prijuĝu la aferon nur laŭ niaj. Ni ne estu revuloj, ni estu agemuloj memorante la frazon: "La proletaria klaso povos liberigi sin nur per propraj fortoj kaj agoj!"

*Por la provizora IIa faka komitato: Konrad Deubler, München,* Arcis-str. 48/2. r. Germanlando.

# Klarigo[1])

Car hazarde malaperis el la lasta paĝo de "Sennaciulo" n.o 12, la vorto: *Reklamado,* mi volas sciigi al la k.doj antaŭ kiuj mi estas respondeca, ke mi pagis por la enmeto de la "Alvoko al la liberecanaro", laŭ la tarifo de la reklamado, t. e. 55 frankoj. *J. M. Esperanto.*

1) Necesas aldoni al la "Klarigo" de k.do J. M. jenan..... klarigeton: Nia k.do unue petis, ke ni enmetu tiun anoncon senpage, samkiel ni jam faris por la alvoko de k.do Deubler al la anoj de la IIa Internacio (n.o 3) kaj por tiuj de k.do Bässler al la komunistoj. Ni rimarkigis al J. M., ke lia alvoko celas fondon de aparta organizaĵo kaj tute ne similas la jam publikitajn alvokojn. Ni aldonis, ke se temus pri alvoko al la anarkistoj por ke ili *fake* laboru en SAT, kiel la socialistoj kaj komunistoj, ni volonte enmetus ĝin.

Tial ke li ne volis rezigni pri fondo de aparta organizaĵo, nia k.do J. M. denove petis, ke ni enmetu lian alvokon kiel anoncon, preskaŭ kulpigante nin pri malemo akcepti tion, kion sendas la anarkistoj. Sekve, por montri nian konsentemon kaj nefanatikecon, ni akceptis la anoncon. Cetere, k.do J. M. asertis al ni, ke la iniciatantoj de tiu fondota organizaĵo ne celas malutili al SAT. Ni volas esperi, ke nia k.do pravas kaj sincere parolis. *E. L.*

**Kun n.o 15 resp. per div. lokaj perantoj estas dissendita la voĉdonmaterialo por ĝenerala referendumo de la aktivaj membroj de SAT. Kiu ne ricevis, postulu ĝin ĉe ADMINISTRACIO.**

**ESPERANTIO**

monata 16-paĝa enhavriĉa kaj bonege ilustrita esper. revuo por socia kaj arta vivo, literaturo, scienco, sporto, filatelio, humoro ktp. — 10 numeroj kostas 4.— ormk., 5.— sv. fr., 1 dol. aŭ egalvaloro. — **P. Hitrov, Berlin-Charlottenburg 2, Fach 18.**

**Jarabono:** Argentino 6 pesos; Aŭstrio 120000 kr.; Belgio 36 fr.; Brazilo 13 milr.; Britio 110 penc.; Bulgario 220 lev.; Ĉekoslovakio 60 kr. ĉ.; Danio 10 kr. d.; Estonio 650 mk.; Finnlando 70 mk.; Francio 35 fr. fr.; Germanio 8 mk. or.; Hispanio 13 peset., Hungario 8 kr. or.; Italio 36 lir.; Japanio 4.50 jen; Jugoslavio 130 din.; Litovio 16 lid.; Nederlando 6 guld.; Norvegio 14 kr. norv.; Polio 8 zlot.; Portugalio 40 esk.; Rumanio 350 lej.; Rusio 4 rubl. or.; Svedio 8 kr. sved.; Svisio 10 fr. svis.; Usono 2.50 dol. — Ankaŭ 1/4 jare abonebla.

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG